



Esperanto
Societo
Frankfurto



Januaro-
Februaro

2024

Esperanto-Informilo



Foto: Tiranosaŭro antaŭ naturhistoria Senckenberg-Muzeo en Frankfurt Bockenheim

Mezaĝo de la prezidanto:

Bondezirojn kaj ĉion bonan al vi kaj viaj familianoj por la komencanta jaro 2024. Kion vi pensas pri la novstilita titolpaĝo; ĉu plaĉas al vi? la ajn kritiko, ĉu positiva aŭ malpositiva estas ege bonvena. Ni ja bezonas la retrosciigon de niaj estimataj legantoj. Kaj eĉ pli bone se vi mem ekverkas por nia informilo kaj kontribuas per spritaj eseoj, malgrandaj anekdotoj aŭ ŝercoj ... kaj tiel zorgas por la pluvivado de nia kluba bulteno. Kaj laste nia informilo ankaŭ estas ja escenca dokumentilo pri la klubaj aktivecoj kaj pro tio nemalhavebla por la kluba komuneco. Kiel plaĉas al vi la enhavo kun la nunaj rubrikaj. Ĉu bone aŭ ĉu plibonigenda? Precipe por la rubrikaj "Eseo, Rakonto, Diversaĵoj kaj lasta paĝo ja ĉiam bezonatas novaj kontribuadoj de diversaj alternaj verkantoj. Ĉu nia Ei havas estonton en la sia nuna formo kun ĉiumonata eldono? Legu pli pri tio en la rubriko Eseo.

*Mi elkore dankas pro via atento kaj ĝis baldaŭ,
Georg Hennemann*

Rubrikaj ĉi-numere:

- Programo
- El la klubo
- Eseo
- Rakonto
- Diversaĵoj
- Lasta paĝo

Kolofono:

Redaktoro teamo:
Georg Hennemann
Ulrich Fellmann
Korektanto:

**Esperanto-Gesellschaft
Frankfurt am Main e.V.**
www.esperanto-frankfurt.de
Vorsitzender:
Georg Hennemann
Rehgartenstr. 16
35683 Dillenburg
Tel. 02771-8196614

Bankverbindung:

Esperanto-Gesellschaft F.a.M
IBAN: DE75 5008 0000 0771 5717 01
BIC: DRESDEFFXXX
bei: Commerzbank Frankfurt

Jahresbeitrag

ESF+DEB-Beitrag: 96 €
Familienmitglied: 48 €
Nur ESF: 24 €
Familienmitglied: 12 €

Programo

“Dua mardo”
la 9-an de januaro 24
ekde la 19-a horo: Sentema babilado per Zumo
Ligilo: <https://zoom.us/j/97497349753?pwd=OTBsMnladnA3UVhuRy9Ta0dYcFNldz09>





surloke:
Saalbau MÜZ Schönhof
Rödelheimer Str. 38
60487 Frankfurt


“Tria mardo”
Dienstag, den 16. Januar ,24 Mardon, la 16-an de januaro 24

	18:30 h	
Sprachrunde		Babila Rondo
	19:30 h	
Vortrag		Prelego
	U. Fellmann	
"Die Geschichte der denkenden Maschinen"		"La historio de pensantaj maŝinoj"


“Kvara mardo”
la 23-an de januaro, 24
ekde la 19h horo: Senprograma samideana babila renkontiĝo
Stattcafé, Gremppstraße 21, 60487 Frankfurt/Main


Anoncoj:


-  23.4.24 Propono: Membrokunveno la kvaran mardon de aprilo
-  25.5.24 Propono: Somerfesto je G. Schäfer en Stierstadt
-  29.6.24 Propono: Ekskurso al „Vulkanurbo“ Gedern en Vogelsberg-Distrikto
-  Septembro Propono: Migrado kaj jubilea evento en la Naturamika dometo
“Brombacherhütte Lärchenweg, 61389 Schmitten-Brombach”
<https://naturfreundejugend-ffm.de/unsere-haeuser/>

-  5.8. – 15.8.24 Someraj ferioj de Saalbau-MÜZ

Eventoj en la Rejn-Mejn-Regiono:

-  27.12.23 - 03.01.24 *20a Novjara Renkontiĝo 2023/24 kune kun Novjara Internacia Semajno (NIS) en Wiesbaden*
La partopreno (sen la manĝoj) estas senkosta por homoj el la regiono (ĝis 50 km de la renkontiĝejo) kaj por junuloj sub 18 jaroj; bv. aliĝi prefere baldaŭ.

-  15.04.24 – 19.04.24 *Esperanto-Semajno en VHS Sonnemannstraße, Frankfurt de Martin Ptasinski, pliaj informoj:*
<https://vhs.frankfurt.de/de/portal#/search/detail/167920>

-  15.04.24 – 17.04.24 Anoncita vizito de Mikaelo kaj Tetiana Lineckij el Kijivo Ukrainio
kun prelogo dum nia kutima tria mardo, la 16-an de aprilo

Estonto de la Esperanto Informilo


Eseo de G. Hennemann

Karaj legantoj. Ĉu vi rememoras kion mi skribis sur la titolpaĝo de la kune aperigita novembra-decembra eldono de la jaro 2022, kiam mi transprenis la redaktadon de la „Ei“? Do, mi citas:

„La novembra kaj decembra eldono de la Esperanto-
Informilo aperas provizore
redaktita de mi (Georgo).
Por la venonta jaro ni nepre
bezonus novan redaktoron
aŭ redaktoran teamon. Mi
deziras bonan legadon. „

Bedaŭrinde ĝis nun neniu transprenis la redaktadon de la Ei kaj pro tio mi ja volonte pludaŭrigis kaj redaktis la E-Infomilon dum la lasta jaro 2023 kaj eldonis ĝin ĉiumonate. Sed mi ne pretas daŭrigi tion redaktadon en la ĝistempa formo sen plua subteno. Portempa solvo ja povus esti ke la eldonritmo ŝangos de unu monato al

nur du monatoj. Jes, mi pensas ke dumonata aperiĝperiodo estas nuntempe pli oportuna, ĉar informo pri aktualaj eventoj pli facile legeblas per aliaj fontoj, kiel ekzemple retmesaĝoj, nia retpaĝo, nia telegram-grupo ktp... Ankaŭ aliaj E-kluboĵ jam delonge aperigas siajn klubperiodaĵojn nur ĉiujn du monatojn, kiel ekzemple la londona klubo. Kompreneble ni povas diskuti tiun de mi proponitan ŝanĝon dum la venontaj Zoom-kunsidoj aŭ eĉ ankoraŭ dum nia membrokunveno en aprilo. Ĉiukaze se neniu pretas transpreni la redaktan taskon mi ekde nun aperigos la Ei-on en dumonata ritmo, do entute nur kvin aŭ ses eldonoj jare: La apero en la feria monatoj Julio/Aŭgusto ja estas necerta. Super tio mi proponas enkonduki novan rubrikon „El la kluba historio“ en nia Esperanto-Infomilo, kie oni trovas informojn pri aktivecoj de nia klubo el la pasintaj cent dudek jaroj. Se iu pretas verki tiaspecan artikolon ĝi ja ankaŭ povus aperi en la 120-a jubilea memoriga volumo, kiun ni planas eldoni ĉi-jare. Aldone mi proponas estonte ellasi la mencion de la naskiĝtagoj de niaj klubmembroj, ĉar ja ĉiuj eldonoj nun estas publikigita kaj legebla interrete kaj pro tio ĉiu ajn privata datumo kiel nomo aŭ naskiĝdato ne plu devus aperi ĉi-tie sen permeso de la koncernata persono.



Rakonto

(de Felmano Ulriko)

Kiel la egipta kodo estis solvita

Eĥnatono skribis la egiptan flue. En ĉiuj tri formoj, la hieroglifa, la hierata, kaj la demota.

Dum jarmiloj tiuj skribformoj estis paralele uzataj, por malsamaj tekstspecoj. Kreiĝis vasta literaturo, el kiu la romano pri la egipto Sinuho iĝis eĉ konata milojn da jaroj poste, en la 20-a moderna jarcento, en kiu okazis traduko al la tiam uzataj lingvoj.

Sekve de la konkero de Egiptujo fare de Aleksandro la Granda, grekoj ekregis Egiptujon. La reganto Ptolemajo publikigis siajn dekretojn do dulingve, greke kaj egipte, sur papirusoj kaj ŝtontabuloj.

Kleopatro kiel unua egiptujreganta greko lernis la egiptan lingvon kaj kiel sola Ptolemajido kapablis paroli kaj skribi ĝin.

Esmetaĥom skribis la lastan hodiaŭ konatan egiptlingvan grafiton, en la jaro 394, en la demota skribformo.

Poste la egipta skribo pli kaj pli forgesiĝis, la lingvo ŝanĝiĝis, kaj oni nur plu skribis en la greka lingvo de la reganta etno. Eĉ la minoritato, kiu restis je la egipta formo de kristanismo, por skribi kaj deklami la sanktajn tekstojn ekuzis la grekan alfabeton, kun kelkaj egiptskribaj aldonajoj, la t.n. kopta skribo.

Fine de la 5-a jarcento Horapolono publikigis sian greklingvan verkon Hieroglifiko, kiu jam estis miksaĵo de ĝustaj, duonĝustaj kaj malĝustaj informoj pri la iamaj egiptaj skribsistemoj. Ne plu estis uzuloj, nek fakuloj pri ĝi.

Post la invado de la araboj oni ekde la oka jarcento en Egiptujo skribis oficiale arabe. La restintaj egiptaj kristanoj ne plu parolis egipte, tamen dum la sankta meso citis ĝin el la sanktaj

tekstoj. Tiel la lasta formo de la egipta lingvo, la kopta, estis konservita kaj travivis.

En la islama mondo inter edukituloj iam dum la 9-a jarcento estiĝis interesiĝo pri precipe la hieroglifoj. Ibn Vaĥŝijo en la 10-a jarcento analizis la hieroglifajn simbolojn kaj prave rekonis, ke la skribsistemo entenas ankaŭ sonan, do fonetikan, komponanton. Li poste sukcesis atribui al kelkaj simboloj la ĝustan fonetikan valoron. Sed li ne kapablis la tuton deĉifri.

Dum la Renesanco ankaŭ en Eŭropo estiĝis interesiĝo pri Egiptujo kaj ties skribmaniero. Tiam la germana jezuito Athanasius Kircher kaj pluraj aliaj kleruloj okupiĝis pri la deĉifro de la hieroglifoj, sed la libro de Horapolono misgvidis ilin, kaj sekve iliaj konkludoj estis malĝustaj. Ili ja kredis, ke ĉiu hieroglifa simbolo estas signifindika piktogramo, kaj ne komprenis la fonetikan karakteron de la plej multaj skribsimboloj.

Progreso nur okazis kelkajn jarcentojn poste, kiam iu dum la Napoleona militinvado en Egiptujo trovis diskforman ŝtonon surhavanta la saman tekston en du lingvoj, tamen tri skriboformoj: greka, hieroglifa, kaj demota egipta. Temis pri unu de la Ptolemajaj dekretoj, dulingve-triskribe publikigitaj.

Surbaze de tiu feliĉa trovo, apud la loko Roseto, kvar kleruloj iam post iam sukcesis deĉifri la egiptan kodon kaj lingvon:

La svedo Johan David Åkerblad en 1802 ekkomprenis la fonetikan karakteron de la demota egipta kaj sukcesis deĉifri sur la Roseta Ŝtono per komparo de la grekaj kaj demotaj vortoj individuajn demotajn vortojn.


La angla fizikisto Thomas Young en 1814 rekonis la rilaton inter la demota kaj la hieroglifoj. Du jarojn poste li malkovris hieroglifajn ekvivalentojn por multaj hierataj signoj.

La franco Jean-François Champollion rekonis, ke la hieroglifoj ankaŭ havas parte fonetikajn simbolojn, surbaze de komparo de la personaj nomoj, kiuj estis sur la ŝtono aparte indikitaj per kadro ĉirkaŭ ĉiu nomo. Poste li trovis ke kelkaj demotaj literoj troviĝas en la ankoraŭ uzata kopta. Tamen li plu opiniis, ke tiu fonetika uzo de hieroglifoj estis escepta kaj nur okazis ĉe nomoj.

La germana lingvisto Karl Richard Lepsius, kiu inter 1842 kaj 1845 gvidis prusan ekspedicion al Egiptujo, malkovris, ke la egiptaj skribsignoj ĉefe uzatis fonetike, kaj poste aldone eltrovis, ke multaj simboloj ne nur unu konsonanton, sed prezentas du aŭ tri en kombino.

Tiel la hieroglifa "alfabeto" kaj la egipta morfologio povis esti finkomprenata kaj la egipta hieroglifa sistemo estis plene deĉifrita.

--



El la kluba historio

El la klublibro volumo [3], 1986-2001 plukis por vi G. Hennemann


Ekskurso al Seligenstadt:

Ĉu vi sciis ke nia klubo jam ekskursis al urbo Seligenstadt en la jaro 1986, precize la 29-an de majo ?



Vizito el Benino:

Ĉu vi sciis ke en aŭgusto de la jaro 2001 ni jam havis kiel gaston Latifou Gbadamasi el lando Benin?



Diversaĵoj

Ŝerco (sendita de Gundhild):

La ĉefo al la librotenisto:

- Mi aŭdis, ke vi ricevis heredanton lastnokte?
- Je mia salajro oni ne ricevas heredantojn, sinjoro direktoro, sed nur infanojn.

Proverbo de la monato (de G. Hennemann)

La proverbo, kiun mi ĉi-fojon prezentas, temas pri profito kaj kapitalismo:

“Profiton celu, sed aliajn ne pelu”

La problemo kun la tutmonda kapitalisma sistemo estas ke la riĉaj landoj profitas pli ol malriĉaj landoj kaj externalizas siajn kostojn kaj tiel nepre pelas la malriĉaj loĝantaro per ekologiaj problemoj kiel klimatŝanĝiĝo, ekspluatado de resursoj kaj amaso de rubaĵo.

Fonto: http://www.robkeetlaer.nl/esperanto/proverbaro/proverbo_002099.htm

Enigmo (de Felmano Ulriko)

Enigmo: solvo de la lastnumera ei

La lasta enigmo konsistis el tio: ligi kvar frazojn al po unu el kvar de mi nomitaj lingvoj. Unu de niaj klubanoj, estis Georgo, duone solvis ĝin: li atribuis du lingvojn ĝuste (1 kaj 2).

Jen la solvoj:

(1) Tsukue-no ue-ni zasshi-ga arimasu. - Sur la tablo kuŝas gazeto.

-> Tio estis la japana lingvo, skribite latinlitere por ne tro facile rekonigi la solvon :-). Laŭvorte la frazo estas konstruita tiel:

Tablo-de sur-al gazeto-la ekzistas (ari = ekzist, masu = as).

(2) Ardo-a ala garagardo-a? - Ĉu vinon aŭ bieron?

-> Tio estis la eŭska lingvo, ankaŭ nomita la vaska. La eŭska estas la sola travivinto el la tempo de antaŭ la hindeŭroplingvoparolantara invado.

(3) Ra lamazad natkvamia! - Kiel bone dirite tio estas!

-> Tio estas la kartulia lingvo, ankaŭ nomita kartvela aŭ georga lingvo. Tiu lingvo estas sudkaŭkazia lingvo kaj la oficiala lingvo en Kartvelio.

(4) Aŝen kjemilen ŝwegi miŝin! - Se oni ne komencas, nenio okazos!

-> Tio estis la ubiĥa lingvo. Tiu lingvo formortis dum la 1990-aj jaroj. Temas pri nordokcidentkaŭkazia lingvo.

Enigmo nova (de Felmano Ulriko):

Antaŭnelonge aperis la 11-a aldono de la Akademio de Esperanto al la Fundamento de Esperanto. En ĝi, la granda nombro de 900 radikoj estas listigitaj kaj tiel oficialigitaj. Preskaŭ ĉiuj jam delonge troviĝas delonge en PIVO. Tre multaj estas landaj aŭ urbaj nomoj, jam delonge uzitaj, kiel Antverpeno.

Nun la demando: Kiu lando sufiĉe granda ĝis nun mankis, kaj fare de la 11-a aldono nun aperas per eĉ du nomoj, tute malsamaj? Helpinformo: Unu de tiuj du jam estis uzata de Zamenhof, sed antaŭnelonge ĝi eksmodiĝis kaj la landa esperantoasocio rekomendas nun alian, novkreitan radikon.

Lasta paĝo

Invito al nia “zumanta” estrarkunsido okazonta la 9-an de januaro '24 ekde la 19-a horo cele la planadon de la unua duono de la komencanta jaro.

Ligilo: <https://zoom.us/j/97497349753?pwd=OTBsMnladnA3UVhuRy9Ta0dYcFNldz09>

Nia ordinara membrokunveno devus okazi en la unua ĝis dua kvaronjaro. Jam komence de januaro en la estrarkunsido ni kutime diskutas kaj fiksadas la agadon kaj planon de la unua duonjaro. Kompreneble ĉiuj membroj estas invitata partopreni en tiu estrarkunsido.

Rilate al nia membrokunveno en aprilo bonvolu pripensi ĉu vi havas proprajn proponojn aŭ ideojn kaj sendu ilin jam frutempe. El la estraro mi ja volas proponi ke ni kiel ESF e.V. membriĝos en la „Vereinsring Bockenheim“ <http://www.ver einsring-bockenheim.de/> por eventuale profiti lokajn ofertojn kaj por pluvigligi la lokajn klubaktivecojn. Plie ni devas diskuti pri la situacio en Saalbau MÜZ, kiu certe estas ne tro alloga por novaj komencantoj, ĉar en la kutima Friedrich-Rumpf salono mankas taglumo kaj sidlokoj.

Rilate la 120-jariĝo de la fondodato de nia klubo en la jaro 1904, U. Fellmann proponis verki jubilean broŝuron en kiu oni povas trovi rememorindaĵon kaj gravajn okazaĵojn el la lastaj (cent) dudek jaroj. Do ekzistas sufiĉe da temoj kaj taskoj por engaĝiĝi kaj ĉiu membro rajtas mem elekti kampon de laŭvola aktiveco. Por niaj membrokunvenoj ni ĉiukaze elektos denove agrablan salonon en la regiono Frankfurto.

Unua periodo

100 jariĝo

... kaj perspektivo al la estonta 120-jara jubilea volumo

